MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO 3

MARTO 2019 Kol. 407/35

xxxx

por estonta monero estis genuanta knabino enplantanta per la dekstra mano tilian plantidon, tenante en la maldekstra mano la pluajn. La tilia arbo estas slava simbolo – do, ankaŭ de ĉeĥa kaj slovaka nacioj. Por sia modelo ŝi prenis fotografaĵon de juna knabino. Problemo estis, ke tiun ĉi knabinon sendis la tiama komunisma reĝimo jam en 1954 por 10 jaroj en prizonon, pro ŝiaj regulaj aktivaĵoj de la landa skolta movado. La skoltoj kaj ilia agado estis en la tiama Ĉeĥoslovakio malpermesitaj.
Se ĉeĥaj policanoj malkovrus tiam la fakton – ke la tiutempa prizonulino servis kiel projekto por la nova monero, certe la skulptistino mem nepre finiĝus same en prizono. La menciita knabino estis tiam la 19-jara ĉeĥino Bedřiška Synková – vidu ŝian bildon:

La supre menciita artistino aŭdis pri la okazintaĵo de Bedřiška Synková de ŝia patrino. La patrino de Bedřiška laboris kiel sekretariino en praga arto-altlernejo, kie la artistino estis instruanta junajn adeptojn de skulpta kreado. Kiam la patrino rakontis al ŝi la teruran aferon de sia filino, la artistino tuj decidis sin venĝi al la komunisma reĝimo. Ŝi petis de la patrino foton-portreton de Bedřiška kaj realigis sian ideon en la formo de gipsa modelo. Kun ĝi ŝi aliĝis al la artaĵ-konkurso.

Tiam naskiĝis kuraĝa ago. Pri ŝia ideo de propono de la artaĵ-projekto neniu devis scii. La artistino riskis, ke la komunisma reĝimo – se oni pruvus la malicon damaĝi la ŝtaton – oni povus konsideri ŝian agadon kiel formon de sabotado kaj primoko. Reago de la reĝimo certe povus fariĝi por la artistino fatala. Tamen ŝi ne timis eblajn konsekvencojn de sia decido.

La konkurson partoprenis pli ol 100 aŭtoroj. La faka ĵurio elektis el ĉiuj proponoj la motivon kun metalurgiisto. La rezulton de la konkurso tamen devis ankoraŭ konfirmi la ministro de financoj Julius Ďuriš (1905-1986), ĉar li havis en la konkurso la lastan kaj la plej gravan vorton. Li trarigardis la unuopajn proponojn kaj sen longa pripensado sekve tute nekonscie montris al la propono kun la prizone punata Bedřiška Synková. Lia decido jam estis definitiva.

La moneron stampis Ŝtata monerfarejo en Kremnica (nun en Slovakio) el alojo 91 % Cu (kupro), 8 % Al (aluminio) kaj 1 % Mn (mangano). Ĝi estas nemagneta, havante ŝtupdentitan eĝon, diametron 23 mm, mason 4 g. Ĝi validis de la 2-a de septembro 1957 ĝis la 31-a de decembro 1992, do entute 35 jarojn. Plej interese estas, kian mision ĝi prezentis.

Dum la tempo ŝanĝiĝis la averso de la monero laŭ ŝanĝoj de la ŝtata sistemo – de la 2-a de septembro1957 ĝis la 30-a de novembro 1961, tie estis malgranda blazono (kronhava leono) de la Ĉeĥoslovaka respubliko (ĈSR). De la 1-a de decembro 1961 ĝis la 30-a de marto 1990 tie estis la blazono (stelhava leono) de la Ĉeĥoslovaka socialisma respubliko (ĈSSR) kaj de la 1-a de aprilo 1990 ĝis la 31-a de decembro 1992 la nova blazono de la Ĉeĥa kaj Slovaka federacia respubliko (ĈSFR).

Kaj kia sorto trafis la malliberigitan Bedřiška mem?

La patrino de Bedřiška decidis batali por sia malliberigita filino. Ŝi vizitis la Centralkomitaton de Komunista partio de Ĉeĥoslovakio en Prago kun skriba postulo pri liberigo de la

filino. La patrino konis tie neniun, tial ŝi nur hazarde ekfrapis sur la pordon de iu oficisto. Li rifuzis akcepti la postulon, kialo – ke tiu ĉi afero ne apartenas al lia agendo. Do, la patrino kuraĝe diris al li, ke ŝi turnos sin al lia ĉefo. Li ektimis (ĉar tiam regis tempo, kiam ĉiu timis unu la alian) kaj la postulon li tuj akceptis.

blazono de ĈSR *blazono de ĈSSR* *blazono de ĈSFR*

Li forportis ĝin al Antonín Novotný (1904-1975), la tiama prezidento de la Ĉeĥoslovakio. Novotný ne tro studis la postulon kaj senhezite tuj konsente subskribis ĝin. Do, dank´ al tiam tre potenca komunisto Bedřiška estis liberigita el la prizono, kie ŝi suferis „nur“ kvin, anstataŭ dek jarojn. Baldaŭ post sia liberiĝo ŝi renkontiĝis - vizaĝo kontraŭ vizaĝo kun Marie Uchytilová-Kučová, al kiu danke ŝia bildo estis tiam en monujoj de ĉiuj homoj en nia lando.

Mallonga ŝanco revivigi skoltadon en Ĉeĥoslovakio

La politika situacio en Ĉeĥoslovakio komencis en 1967 laŭgrade liberiĝadi kaj samtempe tio validis ankaŭ por la skoltismo. Bedřiška – malgraŭ tio, ke tiu ĉi movado venigis ŝin post kradon – ŝi komencis denove engaĝiĝi en la afero. Tiutempe ŝi ankaŭ trovis edzon, kun kiu ŝi naskis la fileton Albert.

Sed la okupacio de nia lando pere de la armeoj de la „Varsovia pakto“ en 1968 denove malvarmigis la politikan situacion.
Do, Bedřiška kun sia edzo kaj unujara filo decidiĝis elmigri;

unue en Vienon kaj sekve en Svisujon, kie ili decidis daŭre vivi. Tie Bedřiška engaĝiĝis politike – ŝi gvidis „Mondan asocion de iamaj politikaj prizonuloj“ kaj eldonadis gazeton „MUKL“. La n*un 83jara Bedřiška, edziniĝinta Hoffmannová-Synková (*1935), vivanta de la jaro1968 en Svisujo.*

Kaj la skulptistino Marie Uchytilová-Kučová … ?

La kuraĝa virino Marie Uchytilová-Kučová bedaŭrinde ne ĝisvivis liberan Ĉeĥoslovakion. Ŝi mortis la 16-an de novembro 1989, do – unu tagon antaŭ komenco de tiel nomata „velura revolucio“. Per ŝia unukrona monero ni pagis ĝis divido de Ĉeĥoslovakio je du memstaraj ŝtatoj – Ĉeĥa respubliko kaj Slovaka respubliko.
Konklude: Unukrona monero kun motivo de la knabino enplantanta tilion, fariĝis la monero, kun plej longtempa reala valideco (35 jarojn) en moderna historio de la tiama Ĉeĥoslovakio. Estas historia paradokso, ke maljuste punita knabino havis tiom longe sian propran „monumenton“ en poŝo de ĉiuj ĉeĥaj kaj slovakaj civitanoj. Ing. Josef Kříž
(La skulptistino estas fame konata precipe pro la grandioza monumento de „La infanoj el Lidice“ – 48 infanoj el la vilaĝo Lidice, elbruligitaj de nazianoj, kiuj neniam revenis.M.Turková

Trajntransporto de handikapitaj homoj

Ĉeĥaj Fervojoj transportis en la jaro 2018 rekordan nombron da vojaĝantoj kun handikapo. Helpe de unika rezervadsistemo la vojaĝon (eĉ malantaŭ la landlimojn de Ĉeĥio) mendis 7546 registritaj klientoj. Pliajn kelkmilojn da handikapitaj homoj Ĉeĥaj Fervojoj (*ČD*) transportis krom tiu ĉi sistemo.

La rezervadsistemo ebligas facilan rezervadon de la vojaĝo inkluzive de bezonata asistantaro dum entrajnigo aŭ eltrajnigo inter trajnoj por pasaĝeroj kun handikapo, ekzemple en rulseĝoj. Multaj rulseĝantoj danke al la regula enkonduko de senbarieraj vagonaroj aŭ vagonoj kaj modernigo de stacioj jam eĉ ne postulas asiston kaj vojaĝas sen antaŭa mendo.

La fakta nombro da transportitaj klientoj kun handikapo do estas eĉ pli ol duobla. Modernaj senbarieraj vagonaroj ebligas facilan entrajnigon ne nur al homoj en rulseĝo, sed ankaŭ al maljunuloj aŭ gepatroj kun infanĉaretoj kaj malgrandaj infanoj.

Por nevidantoj trajnoj estas ekipataj per specialaj radiofoniaj sendiloj/riceviloj, kiuj de malproksime malfermas enirpordon de la trajno, kaj per informoj en Brajla skribo. Por neaŭdantoj estas ĉiam pli multaj trajnoj ekipitaj per vidaj informaj sistemoj. En la trajnhoraro 2019 Ĉeĥaj Fervojoj trajn-ekspedas entute 5066 senbarierajn trajnojn tage kun vagonoj modifitaj por vojaĝado de pasaĝeroj en ĉareto, inkluzive de senbariera necesejo aŭ platoj kaj levinstalaĵo por eniro kaj eliro de tiuj ĉi personoj.

(Laŭ ČD *2/2019)* *Jindřich Tomíšek*

Kiel voki policon, kiam ni estas jam oldaj kaj ni moviĝas malrapide.

Vítek Novák, jam pli maljuna sinjoro el la urbo Zdice, volis enlitiĝi, kiam lia edzino diris: „Vítko, en la tenejo estas lumo. Eble vi forgesis estingi ĝin.“ Vítek el la litĉambro vidis la lumon, li volis iri estingi, sed subite ekvidis, kiel du homoj ŝtelas objektojn.

Li telefonis policejon, ili demandis, ĉu estas ankoraŭ iu alia en la domo. Vítek diris, ke ne, sed eble ciganoj elŝtelas ion el lia tenejo. La policisto telefone diris, ke tie neniu estas, kiu nun povus alveturi al li. „Ŝlosu la domon kaj ni alveturos, kiam iu venos ĉi tien.“

Vítek diris: „Bone,“ eksidis kaj nombris ĝis la numero tridek. Poste li denove vokis al la policejo. „Bonan vesperon, antaŭ momento mi vokis, ke mi havas en la tenejo ciganojn, kiuj ŝtelas. Jam ne zorgu pri tio, mi jam pafis ambaŭ.“ Kaj li surmetis la telefonon.

Dum ne tutaj tri minutoj alveturis tri aŭtomobiloj plenaj de policistoj, super la kapoj ekpendis helikoptero kaj ankoraŭ aperis ambulanco.

La policistoj kaptis la ŝtelistojn ankoraŭ ĉe la ago kaj tuj ilin arestis. La ĉefpolicano diris al Vítek. „Mi pensis, ke Vi diris, ke Vi elpafis ilin.“ Vítek respondis: „Kaj mi pensis, ke Vi diris, ke Vi havas neniun en la policejo.“ Fakte tio okazis. Estas grave ne mensogi al oldaj homo.

El la interreto, trad. jary

I n v i t o

Esperanto-rondeto de doktoro Hradil en Mladá Boleslav kun AEH organizos jam la 49-an lingvan seminarion en la ŝatata loko **S K O K O V Y** en la tagoj de

la 3.–7. 4. 2019. La restado estas taŭga por komencantoj kaj progresantoj, por refreŝiĝemaj turistoj, por ĉiuj, kiuj ne amas solecon. Vespere eblas aŭskulti prelegojn aŭ rigardi videojn aŭ fotojn de diversaj eksterlandaj raportaĵoj, ktp.

Jindřiška Drahotová,+420720 652 320, drahotova@esperanto.cz

Trista anonco

La 5-an de februaro 2019 forpasis **Věra Podhradská,** (*13.8.1939) iama prezidantino kaj honora membrino de ĈEA, organizantino de multaj konferencoj kaj funkciulino de la Somera Esperanto-tendaro en Lančov. Věra estis tre ŝatata de multaj membroj kaj de tendaranoj de SET. Ŝi komencis lerni Esperanton kiel 11-jara knabino. Ŝi tre mankos inter niaj esperantistoj.

Honoron al ŝia memoro. red.

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice
Redaktoroj: Jarmila Rýznarová, Ludmila Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **466 611 941**
e-mail: **aeh@esperanto-aeh.eu** interreto: **www.esperanto-aeh.eu**
Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010
Bankovní spojení: Fio banka , číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**
IBAN: CZ3520100000002801322017 SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX
La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ 10 € (e-mail)
Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.
Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.